

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 2 svisaj frankoj, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anonctarifo: 1 kv cm. — 1 levo;

korespondo: 1 vorto — 1 levo. Por fremdlando — duoble. Poŝtĉekkonto No 1133

Adreso: str. Alabin, 50. SOFIA, Bulgario.

Jaro XVIII

Januaro-Februaro 1937

5-6

PAZARGÏK,

la kongresurbo de nia
XXIV-a esperanto-kongreso.



Ĝenerala

aspekto

de la urbo

La nuna malkonkordo en la internacia esperanto-movado

En la pasinteco la bulgara esperantistaro vivis sian fermitan vivon kaj ofte la krizaj momentoj en la tutmonda movado pasis eĉ nerimarkataj de ĝi. Tiel ĝi absolute indiferece renkontis la skismon de la idistoj en 1908-9 jaro; la malkonkordo inter la du centroj en Parizo en la epoko antaŭ la milito, la disputoj inter prof. Carlo Bourlet („La Revuo“) kaj prof. Théophil Cart („Lingvo internacia“) ne trovis reflektan inter niaj tiamaj samideanoj. La pli inteligentaj kaj pli intereseblaj inter ili sekvis tiujn batalojn, sed nur kiel observantoj, inklinate nek al la unu, nek al la cetera partio. La restanta amaso de esperantistoj plene ignoris tiujn aferojn.

Hodiaŭ denove en la esperantista movado internacia aperis malkonkordo. Post periodo de batalado inter apartaj grupoj kun apartaj konceptoj interne en UEA, nun ni estas atestantoj de unu pli grava disiĝo: unu impona kvanto de UEA-agantoj trovis, ke estas necesa reorganizo de tiu asocio kaj balotigis per la delegitoj decidon, ke la direkta centro translokiĝu en Londonon. Tion kontraŭagis alia kvanto da UEA-anoj, plejmulte loĝantaj en Svislando. Ili bazis sian malkonsenton sur la statutaj tekstoj pri la proceduro de decidoj de tiaj demandoj kaj serĉis la juĝan solvon de la tribunalo. La lasta decidis favore al la ĝisnuna gvidloko de UEA — Ĝenevo.

La demando tamen ne estis pri jura formaleco, sed pri principaj konceptoj. Do, la „londona partio“ logike decidis formi internacian organizaĵon de la esperantistaro konforme al siaj komprenoj.

Kaj nun fakte ekzistas du paralelaj organismoj: Universala esperanto-asocio (Ĝenevo), kun sia ĝisnuna strukturo, kaj la Internacia esperanto-ligo (Londono), kiu prezentas modifon de UEA, konsistanta el landaj esperanto-asocioj, el individuaj membroj kaj el lokaj delegitoj.

Ĉiu el ambaŭ organizaĵoj invitas la esperantistaron al si. Denove la animo de la esperantistaro estas dupartigita. Iuj vidas en la nuna situacio tre gravan danĝeron, eĉ pli gravan ol la Ido-skismo antaŭ 30 jaroj.

Intere la bulgara esperantistaro ankaŭ nun ne estas tre atenta kaj partoprenema en tiu ĉi malkonkordo. Tiu konduto estas klarigebla unuflanke per la aparta malforta stato de la organizita esperantistaro en nia lando; en la momento la pli proksimaj taskoj de la nacia movado prezentas por ĝi sufiĉan zorgon kaj ŝarĝon, por trovi tempon kaj inklinton al okupiĝo pri la problemoj de la internacia esperantomovado. Aliflanke tiu sinteno estas esprimo de la modesteco de la bulgaroj kaj de ilia sento, ke en tiaj grandaj problemoj ne estas ili, kiuj plej rapide prenos decidon kaj diros sian parolon.

Kiel prezidanto de la Bulgara esperantista asocio mi trovas, ke tiu ĉi modesteco kaj nerapidemo pri kategoriaj decidoj estas la plej deca pozicio, kiun povas kaj devas akcepti nun la organizita bulgara esperantistaro.

Certe la batalo plifajriĝos iom post iom. La frankvila tono de la disputo ne povos konserviĝi por longa tempo. Tio ĉi estas neevitebla disvolviĝo de la afero, konante la homan naturon.

Kaj tamen mi ne estas pesimisto. En kiaj ajn formoj esprimita, tiu ĉi batalo ne estos ruiniga por esperanto-movado. Ni atendu la finon trankvile, estimante la du kontraŭajn partiojn — ili ja tamen estas kaj restas esperantistoj. Kaj kiam komenciĝos la pasiaj reciprokaj ofendoj kaj kulpiĝoj, ni renkontu ĉiun parolon kun antaŭe firmigita konvinko, ke tio estas epizodo — neevitebla tempesto, post kiu sekvos denove serena vetero kaj eble pli abunda vegetaĵo en la esperanto-ĝardeno.

At. D. Atanasov — Ada

ГОТВЕТЕ СЕ ЗА ПАЗАРДЖИКЪ!

Конгресътъ обещава да бжде единъ отъ най интереснитъ.

Изпратете веднага алиджило и 20 лв. конгресна такса.

Адресъ: Иванъ К. Василевъ, ул. Батакъ, 26. Пазарджикъ.

IRINKA — GRIZA KOLOMBO

(bulgara popola kanto)

Leviĝis brila Aŭroro
apud la blanka Danubo;
ne estis brila Aŭroro,
sed junulino Irinka;

sur osta kadro ŝi brodis
kaj varme preĝis al Dio:
— Ho Dio, Supra Sinjoro,
ŝanĝu min, Dio, faru min,
faru min iu besteto,
faru min griza kolombo,
por ke mi alten forflugu,
por ke mi vaste rigardu
kaj mi al Stambul foriru,
ke mi surflugu, surflugu,
malliberejon malluman,
kie sidadas Stojano,
Stojano, kara frateto;

sidadas dekon da jaroj
pro pezaj ŝuldoj de patro!
Tiam ŝin Dio kompatis,
ŝin Dio ŝanĝis kaj faris,
ŝin faris griza kolombo,
kolombo alten forflugis
kaj ekrigardis vastege,
al Stambul flugis rapide
malliberejon malluman.
Tri tagojn sidis kaj noktojn,
sidadis, ploris torente,
tragutis akvo tra tegment'.

Interne sidas Stojano,
administranton demandas:
— Administranto, kara frat',
kial gutadas tra tegment'?
Ĉu estas pluvo somera,
ĉu estas neĝo dum vintro?

Administranto respondas:
— Ne estas pluvo somero,
ne estas neĝo dum vintro,
sed estas griza kolombo;
malliberejon surflugis
tri tagojn ĝi jam ploradas,
tri tagojn ploras kaj noktojn.

Stojan mallaŭte parolis:
— Administranto, kara frat',
malfermu al mi la pordon,
ke la kolombon mi vidu!
Administranto konsentis,
al ĝi la pordon malfermis.
Eniris griza kolombo,

50 JAROJ

Lingvo kara kaj belsona,
lingvo de malriĉa ar'
lingvo de ideo bona
lingvo de la tufhomar'!

O vi, lingvo esperanta,
flugu tra la tuta mond'
esperanto, lingvo sankta,
vi de l' p a c o estu — pont'!

Faris vi la ekzamenon
brile ĉe la kruda viv'
vi renkontis malkomprenon
kaj atakojn trovís vi!

Persekutis vin barbaroj
kaj minacis per detru'
pruvon donas kvindek jaroj:
mortos vi neniam plu!

Brilos nia verda stelo,
kreskos nia legion',
paco regos sur la tero —
ne ektondros plu kanon'!

Zefiro

EPITAFIOJ

1.

Li ne ŝatis la viandon,
pri sobreco li laboris,
sed — de fore jam odorís
je tabako kaj je brando!

2.

Ĉiu scias, ke li estis homo bona,
sed afer' diabla estas ja la mono —
jen fariĝis li kasisto — kaj subite
kun la kaso forveturis inkognite! . . .

3.

Li mem sin konsideris brava viro,
tre bonkora, justa individ'
sed li kiam mortis — ĉiu dirís kun sopiro:
»Glor' al Dio, mortis unu parazit'!« . . .

Rinma

Ne estis griza kolombo,
sed junulino Irinka,
de Stojan kara fratino.
Ŝin ĉirkaŭprenis en vivo,
en morto ili disiĝis.

Trad.: Simeon Hesapčiev — Smetkarev

LA SENMORTA ALBATRO

La 8-an de decembro 1936, la esp. societo „Albatro“ en Varna fariĝis objekto de barbara atenco.

Nekonataj mallumaj elementoj dum la nokto ĵetis bombojn kontraŭ la klubejo, kaŭzante damaĝojn. La atencintoj restas ĝis nun nekaptitaj.

Albatro flugas super maro
kviete plaŭdas ĝi flugilojn,
ĝi venkas spacojn, venkas barojn,
disportas interkomprenilon.

Aperas tromb' terura,
ekbolas nigra mar'
ektimas mond' kultura,
ektimas la homar'!

Fiere nur Albatro flugas,
ĉar portas ĝi ideon bonan;
ĝin kataklismoj ne timigas,
al homoj sendas vokon sonan.

Enviis la fiuloj
al ĝia granda fori'
ekvolis la stultuloj
alpafi al la korp'

Ho, malpaculoj nigraj, aĉaj,
pigmeoj de la malprogreso,
vi volis senmortulon murdi —
ho ve! rezistiĝi ĝi kun deco!

Ĝin ne timigas ŝformoj,
rabio kaj obskur'!
Tra ŝtonoj kaj tra dornoj
progresas la kultur'!

Konstante semas birdo sankta
la lumon inter homaj gentoj
kaj spite al la aro vanta
ĝi vivos multe da jarcentoj!

Zefiro

Vladimir Harizanov

La celpupo

La ondoj de la riverego malrapide sin trenas kaj flustras antikvajn historiojn al la preterborda salikaro. Ĉe la nova ferbetona ponto balanciĝas boateto, ĉenita per malnova rusta ĉeno al hoko, fiksita ĉe la ponto-bazo.

En ĉi tiu boato mi noktumis dum kelke da vesperoj, post longa klopodado tra la urbo por serĉi laboron. Kaj ĉi tie min trovis unu vesperon tiu stranga labordonanto kun ŝvelintaj okuloj kaj dormema fizionomio.

— Hej, vi tie? — lia voĉo tondris.

— Jes, mi, kion vi volas?

— Elvenu el la boato!

— Por ke vi eniru?

— Ne, ne por eniri, la viro mole re-diris. — Mi al vi parolos.

Mi leviĝis bedaŭrante, ke oni rompisan izolecon kaj trankvilon.

— Kion vi deziras?

— Al mi vi voku: „Patrono“^{*)}.

— Ha! Patrono! Al mi vi ne ŝajnas esti inda havi ĉi titolon!

— Sen ŝercoj: ĉu vi volas labori ĉe

mi? Mi havas barakon ĉe la foiro. Vi staros antaŭ la publiko kaj ĉiu, kiu pagos la takson de 50 centimoj por tri pilkoj, rajtos ilin ĵeti al via vizaĝo. Kompreneble, vi devos ne gardi vin, sed resti fikse je la sama loko, starante antaŭ la ludantoj. Tio havigas plezuron al la klientoj.

— Kiel estas eble. . . . — mi lin interrompis, sed li daŭrigis paroli:

— Ne timu! Malmultaj vin trafos, ĉar malfacile oni batas vivantan homon je la vizaĝo. Ŝajne ekzistas iu gard-angelo por ni celpupoj. Ja ankaŭ ĉi tio postulas ekzercadon, kaj ordinare la homoj, kiuj plezuriĝas je ni — neniam ĵetis ŝtonon, eĉ al fundo. . .

— Kaj ĉu ne doloras, se oni trafus?

— Ne doloras, la pilkoj ne estas pezaj.

Mi iom pripensis: fine ja ĝi estas laboro, honesta laboro. . . .

— Kiom vi pagos al mi? — mi demandis la „Patronon“.

— Ni gajnos po duono, ĉu vi konsentas?

— Jes, mi konsentas.

— — —

*) Sinjoro, mastro.

Kiom ajn strange estus, sed ĉe la foiroj de Francio la vivanta homo, kiel celpupo, al kiu oni ĵetas pilkojn, estas rimedo por gajni la panon.

En la barako de la „Patrono“ mi vestiĝis en longan veston je ruĝaj kvadratoj, ŝmiris mian vizaĝon per malhele flava farbo kaj kolorigis ruĝe mian nazon, kiu eksimilis kurban ruĝan paprikon. Sur la bruston mi pendigis tabulon kun surskribo:

„TRI PILKOJ — 50 CENTIMOJN“

Kaj la patrono dume persvadis la homojn elprovi sian lertecon: kiu min trafus unu fojon sur la nazon per unu el la tri pilkoj, tiu rajtos ĵeti ankoraŭ tri pilkojn senpage . . .

Komence forestis ludantoj, sed iu el ili decidiĝis, aĉetis pilkojn por du frankoj kaj ilin ĵetis sur min. Kaj li ne povis trafi ne nur mian nazon, sed eĉ ne trafis ie sur la vizaĝon kaj la kapon.

Tiuj, kiuj lin akompanis, priridis lin kaj la viro koleris. Li aĉetis denove pilkojn kaj ree celis al mia nazo.

Pro la unua bato, kiun mi ricevis super la dekstra okulo, ekdoloris mia ventro. Sed ĝi estis kredeble nerva doloro — mi opiniis. Mi treege streĉis min por resti staranta kaj ne moviĝi, kiam mi vidis la pilkojn bruflugi al mi.

Ĉe mi, dum kelkaj tagoj, kiam mi laboris ĉe la „patrono“ — formiĝis speciala sento, ekkoni kiam mi estos trafita. En tiuj momentoj mi bedaŭris min mem: mi havis fortikajn brakojn kaj mi estis talenta, sed mi ne povis trovi laboron, ĉar mi ne havis monon, por ĉie serĉi tra la vasta dia mondo.

Tial je ĉiu bato sur la okuloj aŭ la nazo, doloris mia stomako kaj mi emis kapti tiujn, kiuj batis min per ĉi plezuriga maniero kaj ilin bani en la riveron. La ludantoj, kompreneble, ne rimarkis tiun internan barakton ĉe mi kaj senzorge min celis.

— Li estas mirige trankvila — rimarkigis juna homo en sporta kostumo kaj la knabino, kiu lin akompanis, ridis per delikata rido, rigardante al mia nazo. Mi deziris, ke ŝia kavaliro min batu eĉ ne per unu pilko, kvankam li aĉetis pilkojn por kvin frankoj.

Mia deziro, evidente, estis tre forta

kaj deklinis la batojn kiel blovanta magneteto. La sportisto iris for, je mia granda plezuro, kun malaltigita humoro, kaj la knabino — iom senluziĝinte je li.

Ŝi kelkfoje turniĝis por min rigardi, mirante miajn kapablojn, verŝajne. Mi ŝin rigardis per malklariĝintaj okuloj, jam ŝvelaj pro la batoj, kaj mi kunpremis la dentojn . . .

La sportisto estis anstataŭita de korpulenta sinjoro kun monoklo kaj gantoj el porkhaŭto. Li ne deigis la gantojn kaj ĵetinte pilkojn por pli ol kvin frankoj, ĉiam maltrafe, iris for.

— La pilkoj estas ekscentraj*) — li konkludis, ĝustigante la monoklon.

„La Patrono“ signifoplene okulsignis al mi.

Mi tamen ne povis forgesi kun kia malico ĉi „kliento“ ĵetis la pilkojn sur mian propran senformigitan kapon.

Tiel dum tutaj tagoj oni ĉe mi viciĝis por min celi per la pilkoj, kaj mi ilin akceptis per la kapo, kiel celpupo, sur kiun la infanoj ĵetas ŝtonojn . . .

— — —
Vi povas vidi ĉe mi unu el tiuj pilkoj. Mi ĝin konservas kiel rememoraĵon pri tiuj kelkaj tagoj, kiam mi servis kiel celtabulo.

Kaj mi neniam forgesos la dividon de la gajnoj, kiun ni faris kun la „patrono“.

— Atentu, junulo, li al mi diris adiaŭante, kiam mi rifuzis plu „labori“ kun li. — En deko da tagoj vi gajnis 100 frankojn kaj pli. Se vi laborus kun mi unu someron, ni rondiros Francion kaj vi perlaboros multe pli. Vi kunnajlos barakon, aĉetos pilkojn kaj fariĝos „patrono“.

— Venos tago kaj vi ankaŭ helpanton dungos. Tia estas la vivo . . . la majstro serĉas helpantojn!

Vi estas saĝa junulo, li daŭrigis—kaj el vi eble estiĝos solida homo. Ne gravas, ke oni sur vin ĵetos pilkojn. Ili ja estas nur pilkoj, ne ŝtonoj . . .

Jes, li estis eminenta „patrono“. Mi certas, ke li min prirabis minimume je cent frankoj. Min oni batis, kaj li prenis la leonan parton. Tial mi lin forlasis.

Li forveturis kun la foiristoj. La saman vesperon mi luis ĉambron en laborista hotelo kaj kiam mi enlitiĝis por dormi, mia kapo pezis kiel plumbo.

*) Kun flankigita ekvilibra centro.

Dimitro Kovačev

La esperanto-insulo

La unua esperanta insulo troviĝas en la granda rivero Danubo, sep kilometrojn malproksime de la bulgara urbo Oreĥovo. Ĉi malgranda terpeco estas nomata "Esperanto".

Dum la jaro 1900. ĉi insulo elnaĝis, sed baldaŭ la ondoj de Danubo subakvigas ĝin, kaj dum iom da tempo la malgranda insulo malaperis por la mondo.

Je la fino de la mondmilito la insulo denove elnaĝas kaj detiam komenciĝas ĝia nova ekzistado.

Tiu-ĉi malgranda insulo estas nuda; oni ne vidas sur ĝi eĉ arbetaĵon... ĝi vere estas tute dezerta.

La esperantistoj de Oreĥovo estas la unuaj regulaj vizitantoj de la insulo. Preskaŭ ĉiudimanĉe la samideanoj ekskursas en la insulon por kuŝi sub la ombro de la sola arbetaĵo — la saliko.

Pasas kelkaj jaroj. Oni mezuras la insulon — ĝi ampleksas 500 dekarojn proksimume, ĝi estas longa 2 klm. kaj larĝa 500 m. Elkreskas salikoj, tremoloj, poploj kaj aliaj arboj, kaj la insulo allogas jam multajn vizitantojn.

Tiu-ĉi fakto interesigas la esperanto-societon en Oreĥovo kaj la komunumo konsentas cedi la insulon koncesie por 20 jaroj.

La societo konstruas malgrandan dometon kun tri ĉambroj kaj alian pli malgrandan kun du ĉambroj. Ĝi faras ankaŭ puton, kiu donas puran kaj freŝan akvon al la vizitantoj.

Kaj la insulo kreskas, plibeliĝas kaj allogas la samideanojn el Oreĥovo.

Jen kelkaj bildoj el la insulo.

FRUA PRINTEMPO

La maljuna Danubo portas pecojn de glacio, kiuj brilas sub la printempa suno. Subtila venteto alblovas. Kiam ankaŭ ĝi ĉesas — ekregas kvieto, majesta kvieto.

Jen krianta mevo, cignoj, anasoj flugas al la insulo por trovi siajn nestojn.

Ekblovas facila vento kaj la poploj, la tremoloj kaj la salikoj klinas salute siajn branĉojn.

Jen albordiĝas malgranda velboato. Venas la samideanoj, kaj sur la insulo eksonas la esperanta himno.

VARMA SOMERO

La varmaj radioj de la suno rebrilas en la kvietaj akvoj de Danubo. Alblovas apenaŭ senteblo venteto.

En la aero traeĥas la gaja trilkantado de la senlacaĵbirdoj. Iliaj kantoj serĉas resonon en niajn korojn.

Ĉie svarmas homoj. Jen iuj sunbanas je la sabla bordo, jen aliaj pilkludas, kaj iliaj krioj reeĥas en la insulo. Aro da infanoj kuras inter la arboj, kvazaŭ ili estas ĉasistoj en ia praarbaro.

Vesperiĝas. La insulo eksilentas. Nur la pala luno ridetas kaj heligas la insulon, Danubon kaj ĉion ĉirkaŭe.

MALGAJA AŬTUNO

La ĉielo malheliĝas. La radioj de la suno ludetas en la aero. Mistera malĝojo premas nin.

La folioj de la arboj jam flaviĝas. Baldaŭ ja falos flava pluvo de arbfolioj.

La insulo dezertiĝas!

Oni aŭdas nek la gajajn trilojn de la birdoj nek la ĝojajn kriojn de la infanoj.

Homoj kaj birdoj malĝojas. La aŭtuno jam foriris kaj nun venos la kruda vintro.

GLACIO SUR DANUBO

Blankaj, tute blankaj neĝofloroj aspergas la teron. Ili kovras la kamparon, la arbaron, la insulon.

Danubo alportas jam grandajn glacipecojn. Danubo bruegas. La granda rivero kantas sian minacan kanton.

La kanto tamen baldaŭ ĉesas, kaj la glacio ĉirkaŭprenas la riveron en siajn frostajn brakojn. Morta silento regas ĉie!

Sed venos la floranta printempo! La insulo reviviĝos kaj la oreĥovaj geesperantistoj revigliĝos kaj ekagos por nia ideo!

Svetoslav Minkov

Talismano

(fino)

— Pli rapide, — la hometo parolas ree tiel malvarmige kaj rigardas sian horloĝon.

Sed la kondamnito povas fari nek eĉ unu paŝon. La timo kunligas lin, en liaj vitraj okuloj erarvagas la rigardo de frenezulo, kaj liaj lipoj flustras nevole:

— Mi mortigis lin!... Mi mortigis lin!

Mi kaj Jon Ĉurila forkondukas lin eksteren.

Tie, antaŭ la pendigilo, la ekzekutisto alĝustigas trankvile la ŝnuron. Vidinte nin, li ĵetas la cigaredrestaĵon, gluitan sur liaj lipoj kaj komencas movi la faligitan tablon.

Tra la kradoj estas vicigitaj la vizaĝoj de la malliberigitaj kiel alarmaj kaj teruraj maskoj.

Ili scias. Ili atendas.

Ni alproksimiĝas.

— Nu — diras la hometo.

— — —

Mi kaj Jon Ĉurila dekroĉas la mortinton kaj demetas la tukon de lia vizaĝo.

Blua vizaĝo kun lango premita inter la dentoj.

Tra mia korpo rampas tremoj.

Jon eligas sian tranĉileton kaj disŝiras la ŝnuron.

— Ĉu vi volas pecon? ... Por rememoro kaj bonŝanco?

Mi puŝas lian manon.

Li kunvolvas la ŝnuron kaj forportas ĝin kun si.

La ekzekutisto traserĉas la poŝojn de la mortinto, demetas liajn vestojn kaj ĵetas la nudan kadavron en veturilon.

Poste li sola suriras ĉe lin, levas vipon, ekfajfas kaj batas la malgrasan ĉevalon.

La veturilo tondras tra la kampo. . . Tio estis iam.

Hodiaŭ de la malliberejo restis nur unu griza muro, kovrita per korvoj, kaj de la pendigito — unu ŝnuro, disŝirita je miloj da sorĉaj talismanoj, kiujn la feliĉ-avidaj homoj portas ĉe sia koro.

Tradukis el bulgara: G. H.

Lingvaj demandoj kaj respondoj

Твърде характерно е за начеващите есперантисти да се нахвърлят върху езика съ толкова голѣмо въодушевление, щото това въодушевление да стигне до ожесточение. Поразени от необикновената простота и леснота на езика, тѣ почватъ веднага да си въобразяватъ, че не само владѣятъ достатъчно езика за себе си, но могатъ и трѣбва да учатъ и другитѣ. Такива начеващи есперантисти сж добри пропагандатори, но твърде лоши езиковеди, защото да се познава граматиката на единъ езикъ, та билъ той и много лесенъ, не е равносилно съ това да се знае самия езикъ.

Напоследѣкъ въ редакцията на списанието ни се получи една „нова граматика“ на есперанто. За да се тури

веднѣжъ за винаги точка на подобни опити, ние даваме тукъ извадки, както отъ самата граматика, така сжщо и отъ писмото, което я придружаваше. Авторътъ на тази граматика е сигурно нѣкой добъръ и вдъхновенъ борецъ за международния езикъ, но вмѣсто да употрѣби своитѣ усилия за усъвършенствуването на езика, той се е заловилъ да учи другитѣ на единъ езикъ, който самъ той още не владѣе добре. Ще ни прости нашиятъ съидейникъ Б. Радославовъ, но ще му кажемъ истината въ очитѣ, та дано да вземе поука.

Въ писмото си той пише: „Пращамъ ви сега една нова граматика на есперанто, за която никакъ не можете ме критикува, колкото и силенъ критикъ да сте насреща ми, затуй защото вече тази метода

детска се прилага отлично във всички държави. Вие трябва дълбоко да проникнете въ разбирането ѝ. . .*

Следъ това колегата продължава, съ явно въодушевление:

„Така че туй накуцване езиково да се схване, победи и не хилави есперантисти да имаме, а сигурни хора“.

Да се анализира цѣлиятъ курсъ, отъ който ще се „печататъ букварчетата, отъ които ще си купуваме“, нѣма време, пѣкъ и нѣма нужда. Ще дадемъ само нѣкои извадки отъ него, за да разбере всѣкой какъ този съидейникъ е изучилъ и усъвършенствувалъ езика. Не ще е лошо, ако управителното тѣло на Б. е. съюзъ вземе нужднитѣ мѣрки, щото подобни „езиковеди“ да не организирватъ курсове и да компрометирватъ и езика и движението.

Целиятъ курсъ разпредѣленъ на 13 урока.

Въ първия урокъ се мѣдри изречението: „La voĉo en la vorto estas ĉiam forta en la antaŭ lasta sílabo!“ Сигурно е искалъ да каже нѣщо за ударението. После следватъ поздравленията: bonan tagon, bonan vesperon и „facilan noktón“ преведено „лека нощъ“ и „multe sanon!“ много здраве.

Следватъ въ другитѣ уроци:

dankon — благодаря.

ordonu — заповѣдай (вмѣсто mi petas)

ne kostas — не струва (вмѣсто mi petas)

+ = kaj

— = sen (!)

× = po (!)

: = divíde (!)

= egale

cento — стотинарка

mílo — хилядарка,

ĉar — защо?

Въ деветия урокъ има обяснения на винителния падежъ. Ето ги въ оригиналъ:

Se ni díros: Ivano batas Stojano, ni ne scías kiu estas batita kaj ĉu la unua kaj la dua estas knaboj aŭ knabinoj. Pro tio ni skribas la finon de unu laboro la vorton kun *n* en la fino. La fino de laboro, la fino de montro, la pezo, la longo, la kosto, la dato, la loko de eniro, la

tempo de resto volas literon *n* por sia vorto, kiu vorto estas rekta komplimento kaj ĝi ĉiam respondas al demando: kiu? kiu?

Ето и обясненията на нѣкои представки и наставки:

bo — genero per egzigo

eks — бившъ — eksociĝero — запасенъ офицеръ

ge — patero — родителъ — patro — баща — gepatro — родителъ (или майка или баща).

aĉ — мръсно.

aĵ — materio (вещество) forta — силенъ, fortikaĵo — крепостъ.

eĵ — мѣсто работно — laborejo — работилница (интересно дали „dormejo“ е „работно мѣсто“?)

ig — правя другиму.

iĝ — на себе правя.

ismo — наука, Budo, Мохамедъ, Budismo — Будизъмъ.

nĵ — глезено за жена.

По нататѣкъ въ курса:

Jara-cento — столѣтие.

Kristo — Христосъ. Kristnasko — Коледа.

Naska antaŭ-vespero — Бждни вечеръ.

Grandega TAGO — Великдень.

Ĉieliro — Възкресение.

Nova Jaro — Нова година.

Gratulan novan Jaron — честита нова година. (Коего на български значи: „Поздравителна нова година“).

Въ курса тукъ-тамъ сж дадени «ekzercoj» повечето отъ които сж като тѣзи: „Fraŭlino, ĉi estis bela estas bone“.

„La elpensinto de Esperanto — ĝia aŭtoro estas s-ro doktoro Lazar Ljudovik Zamenhof, knabo naskita je 15-an decembro 1859 jaro, en urbo Belistok en lando Polŝa — Litovia en familio de gimnazia instruisto Marko Zamenhof la patro (kin instruas la modernajn ligojn) kaj la patrino: Rozalia Zamenhof — senta idealistino.“

Ĉiam la patro bruligis la esperantajn librojn de sia filo, kaj la lasta kiam finis la gimnazion, poste universitaton dentkuracan li denove verkis kaŝe siajn kalendarojn po esperanto, kaj eldonis ilin per la mono de sia edzino.

Poste fondis U. E. A. (Universala esperanto - asocio). Li mortis je 14-an aprilo 1917 jaro.

E. S.

Г. М. Шуменъ. — Пита, правилно ли е да се употребяват мѣстоименията *kiu tiu*, както за одушевени, тъй и за неодушевени предмети и не би ли трѣбвало въ втория случай да се употребява *kio tio*.

Отговоръ. Мѣстоимѣнията съ характеренъ завършекъ *u* (*iu, iu, kiu, ĉiu, neniu*) не означаватъ тѣкмо *лице*, а опредѣлятъ индивидуални лица или предмети измежду много еднородни. Напр.: отъ всички книги *коя книга* си избирашъ: *el ĉiuj libroj kiu n libroj vi elektas*. *Коя рѣка* тече покрай България. — *Kiu rivero fluas preter Bulgarijo*. Въ български езикъ равнозначитѣ на това мѣстоимение се употребяватъ като прилагателни: този човѣкъ, тази къща, това село, тѣзи планини (*tiu homo, iu domo, iu vilaĝo, iuj montoj*).

* *
Tio значи на български това нѣщо, или съкратено, това: Това е планина — *Tio estas monto*. Тази планина е висока. — *Tiu monto estas alta*. *Kio vi vidas?* — Какво (нѣщо) виждашъ? *Kiu arbon vi vidas?* — Кое дърво виждашъ?

Kiu, tiu могатъ да се употребяватъ и безъ да придружаватъ съществителни, както и може да се употреби и всѣко прилагателно, и обикновено въ такъвъ случай се подрежда, че се отнасятъ за лица (Старитѣ не могатъ да четатъ безъ очила. За високитѣ е лесно — ще докопатъ ябълкитѣ безъ книга). *Kiu vivos, iu vidas*. — Който живѣе, той ще види. *Kiu ne sciats, ke . . .* Кой не знае че . . . *Tiu, kiu venos, li povos elekti la plej belan libron*. — Този, който дойде най-напредъ, ще може да си избере най-хубавата книга.

Ni recenzas

Fakto estas, ke la esperanto-movado en nia lando troviĝas en periodo de suprenleviĝo.

Simptomoj pri tio estas pluraj.

Unu el la gravaj kaj ĝojigaj aperaĵoj ankaŭ estas la renaskiĝo kaj la vigliĝo de nia originala esp. verkado.

Aperas nova generacio de esperanto-poetoj. En la nuna n-ro de B. E. ni ĝojas povi aperigi verkojn de du junaj poetoj: Zefiro kaj Rinma.

Ni atentigas pri ĉiu el ili aparte. Zefiro trafas aktualajn esperanto-temojn. Valorege por ni estas, elekti tiajn temojn, kiajn elektis s-ano Z. Lia plumo estas facila. Liaj unuaj provoj — nepre esperigaj.

Surprizas la subtila humoro de s-ano Rinma. Lia sarkasmo trafas pike kaj — efike! Ankaŭ de s-ano R. ni multon atendas.

Nia konata malnova s-no St. Hesapĉiev prezentas al ni belegan popolkanton.

La redakcio bonvenigas la triopon.

*

En la redakcia mapo kuŝas ankoraŭ kelke da tradukitaj versaĵoj: Ivan Dobrev

tradukis du popolkantojn, Steki prezentis tradukaĵon el poezio de Dimitr Ĉakov, Rinma — el Smirneniski („Ŝtonisteto“).

Ĉi-supraj versaĵoj laŭvice aperos sur la paĝoj de B. E. *

Jes, da poezio ni ŝajne havas sufiĉe.

Sed la esperanto-legantaro ofte montras prefere al bela prozo. Kaj prozon — niaj verkemuloj ne produktas! Ni scias, ke, por esti beletristo, oni multon bezonas: observkapablon, bonan stilon, analizan senton, talenton kaj — laboremon. Precipe ĉi — lasta estas bezona. Necesas tamen, ke niaj verkemuloj provu sian plumon ankaŭ sur la kampo de le prozo. Bela komenco estus la „Impresoj pri la esperanto-insulo“, de s-ano Kovaĉev.

Ni invitas speciale s-anon Rinma sendi al ni prozan verkon.

Al s-ano Aslanjan el Burgas ni dankas pri la sendita traduko de O, sole mio (itala kanto). Al li kaj al ĉiuj bonvolaj kunlaborantoj ni informas, ke ni prefere presigos verkojn tradukitajn el bulgara literaturo.

HUMORA PAĜO

ILI PLENDU KAJ PLENDU. . .

Preskaŭ en ĉiuj landoj
 la esperantaj agantoj
 iel malkonsentas,
 amare plendas
 pri la verda popolamaso —
 kaj en ofta okazo
 ne sen bazo.

Ekzemple la esperanta instruisto,
 instruinta kun oferema persisto,
 ĉe kursfino kun teruro
 kaj malplezuro

konstatas,

ke malbone la afero statas:

la regulojn de l' gramatiko
 en la praktiko

liaj lernantoj ne ŝatas,

ĉe ili akuzativo

eterne egalas al nominativo:

»Havas ni hodiaŭ festvespero,

Kukojn estas sur telero«.

Jes, ofte ofendite plendas

la esperanta instruisto

— li ja rajtas esti pesimisto

sed kial plendas la propagandisto?

Propagandajn paroladojn liajn

anemiajn

pri freŝaj faktoj antaŭdiluŝaj

oni ja kelkiam partoprenas

— eĉ neesperantistoj venas —

inerte aplaŭdas,

poste eĉ laŭdas,

ĉar ĉiu parolanto

kun kortiklo ja aŭdas,

kiam lin oni laŭdas.

Multe plendas ankaŭ la eldonistoj,

kiuj donas al la esperantistoj

nutraĵon spiritan,

diverskvalitan:

ampleksajn — du aŭ kvarpaĝajn — gazetojn,

dolore-dolĉajn amdelirojn de poetoj,

verkojn literaturajn,

konsistantajn el romanoj aventuraj

kaj originalaĵoj nematuraj,

kiujn honore karakterizas malavara malŝparo

rilate al lingvo — kaj preseraroj.

Jes la eldonisto plendas

ke senrezulte li dissendas

varbilojn, reklamilojn

— ke librojn li, tamen ne vendas,

ĉar vera esperantisto neniam ion abonas aŭ mendas.

Sed pleje plendas,
 alarme lamentas
 la esperantistaj societoj — la grupoj,
 ĉefe la kasistoj, la monavidaj lupoj,
 ilí la ín-dí-fe-rent-ul-ojn pacajn
 la mal-la-bor-em-ul-ojn lacajn
 ĉiam per altrudo turmentas,
 ilian nepagemon malatentas.
 Bedaŭrinduloj! Vane ilí admonas
 ĉar ilí ne konas
 la esperantistan devizon:
 neniam pagi kotizon.

Do ilí plendu kaj plendu —

nin tio ne ofendu!

Je ĝusta uzo de l'akuzativo ni ne pretendu,
 pri efikaj propagandmetodoj nian kapon ne turmentu,
 librojn, gazetojn — eĉ propralandan — ni ne mendu,
 kotizojn al kasisto neniam sendu,
 ĉiujn avertojn tiurilatajn malatentu!

Prefere ĉiam ni reteneme nur silentu

kaj indiferentu,

sed al la agantoj kaj al gvidantoj niajn postulojn ni prezentu,
 kaj de ilí tuj senprokraste la plenumon atendu —
 jes, ni plenrajte maldiligentu

kaj nin sentu

kun fiero

«altidea kavalir' de la verda stelo».

H.

Tra mia kalejdoskopo

La prezidanto de B. E. A. s-ro Ada, en la unua numero de „Bulgara esperantisto“ donis ideon, kiel krei propagandan fondon.

La afero estas bona, eĉ bonega, sed... la kara prezidanto certe forgesis la gravan esperantan devizon — *Neniam pagi kotizon!* Kelkaj sentaŭguloj raŭke klaĉas, ke malgraŭ tio, la bonega ideo de la prezidanto tamen estas efektivebla... se la prezidanto anstataŭ ideon donus... monon!

S-ro Radoslav Triĉkov el Vratca, la peranto de Universala esperanto-asocio (Genève), disdonis al ĉiuj eksanoj de U. E. A. cirkuleron, atentigante pri la gravaj novaj favoraj kondiĉoj por la bulgaroj. La membrotizoj estas vere tre tre malaltaj, sed ekvidante la daton—la 1-an de aprilo (la dato, kiam oni mensogas en Bulgario) ni dubas, ĉu tio ne estas ia „aprila mensogo“. Ni petas nian karan samcelanon tuj eldoni novan kla-

rigan cirkuleron.

En la lasta duobla numero de „Bulgara esperantisto“ № 3—4, sur paĝo 4, en „Talismano“ de Sv. Minkov ĉe la komenco estas du strangaj esperantaj vortoj „prireme kaj „morante“. Tuj post la ekspedo de „Bulgara esto“ komenciĝis alflugi multaj leteroj el ĉiuj partoj de la terglobo, petante klarigon, ĉar en ĉiuj plenaj vortaroj mankis la suprenomitoj vortoj. Eĉ iuj miaj kursanoj demandis min pri ili. Mi apenaŭ eliris el tiu delikata stato. Mi ne bone memoras, kion mi respondis en la momento, sed ŝajnas al mi, ke mi diris, ke tiuj estas ankoraŭ ne oficialigitaj vortoj, kiujn oni prezentos al la Lingva komitato dum la internacia kongreso en Sofia. Tuj mi kuris al mia amiko G. H., la tradukinto de la rakonto. De li mi eksciis, ke tio estas preseraro — ne estas du vortoj, sed nur unu, nome „prirememorante“. Jen, kion povas kaŭzi unu malgranda preseraro!

XXIV. BULGARA ESPERANTO-KONGRESO, PAZARĜIK 19—22. VI. 1937. JARO

Bulteno № 1

Karaj gesamideanoj!

En la nuna tempo, kiu ne estas favora por nia movado, la bulgara esperantistaro solene festos la XXIV-an bulgaran esperanto-kongreson. Dum 24 jaroj dank' al la laborado, penado kaj klopodoj de multe da konataj kaj nekonataj pioniroj, oferemaj idealistoj, la esperantomovado en nia lando disvastiĝas malgraŭ la baroj.



S-ro G. Kenderov, urbestro,
protektanto de la kongreso.

Ĉu troviĝas en nia lando samideano kiu ne deziras partopreni nian XXIV-an? Ĉu ekzistas samideano kiu ne volas konatiĝi kun la urbo, en kiu je 24-a fojo la bulgaraj geesperantistoj kolektiĝos por festi sian esperantan paskon?

Karaj samideanoj! XXIV-a bulgara esperanto-kongreso devas esti potenca demonstracio de nia movado kaj forta pruvo al la indiferentuloj pri nia ekzistado. La kongreso tamen estos impona se ĝin partoprenus kiel eble plej multe da gesamideanoj. Tial ne hezitu ŝpari tempon kaj monon sed aliĝu tuj kaj partoprenu en ĝi.

La loka kongresa komitato klopodas pri diversaj aranĝoj kaj penas kontentigi la karajn gastojn. Via devo estas propagandi kaj partopreni la dudekkvaran por manifesti nian volon kaj deziron marŝi antaŭen ĝis la venko de nia ideo.

HONORA KONGRESA KOMITATO

S-ro G. Kenderov, urbestro, patrono de nia XXIV-a. Membroj: s-ro Ikonov, kolonelo; s-ro Al. Ĉicelkov, direktoro de B. N. B.; s-ro Labov, direktoro de la gimnazio; s-ro L. Leviĉarov, direktoro de Populara banko; s-ro At. Popov, regionestro.

KONGRESA KOMITATO

S-ro Nikola Jotov, advokato (eksministro), prezidanto; s-ro Ivan K. Vasilev, vicprezidanto; s-ro Georgi D. Spasov, sekretario; s-ro B. Danon, kasisto. Membroj: s-ro Georgi Tanev, direktoro de Bulg. agr. koop. banko; s-ro At. Furnaĝiev, kasisto de B. N. B.; s-ro Ĵak M. Behar, dentkuracisto; s-ro Ĥr. Kokotanov, oficisto; s-ro Vasil Lazarov, oficisto; s-ro Vl. Ŝkenderov, advokato; s-ro Jordan St. Lupov.

PROVIZORA KONGRESA PROGRAMO

Sabato, 19. junio. Renkonto de la gekongresanoj. Vespere interkonatiĝa renkonto.
Dimanĉo, 20. junio. Antaŭtagmeze, Solena malfermo de la kongreso. Posttagmeze komunaj fotografadoj, promenadoj. Vespere kongresa amuzvespero kun esperanto-teatraĵo.

Lundo, 21. junio. Kunsidoj de Bulgara esperantista asocio.

Mardo, 21. junio. Ekskurso al la belega kurorto Lâĝene Ĉepino. Vagonaro irkaj reveno kostos 54 lv.

Fakaj kunsidoj: Organizantoj bonvolu anonci ĝustatempe siajn dezirojn. (Jam anoncita: Internacia movado UEA-IEL).

Aliĝiloj: Dissenditaj per „B. E.“ al ĉiuj abonantoj.

Loĝejoj: Lito en hotelo lv. 20—25. Nutrado lv. 20—30 po tage

Karaj gesamideanoj! Al laboro por nia XXIV-a. Pazarĝikaj esperantistoj plej kore salutas kaj atendas vin.

Lo. Ko. Ko.

Kongresa adreso: Ivan K. Vasilev, ul. Batak, 26. Pazarĝik, Bulgario.

GIS NUN ALIĜIS AL LA KONGRESO LA JENAJ GESAMIDEANOJ:

- | | |
|--------------------------------|--------------------|
| 1. s-ro Georgi Ĥr. Dimov | Varna |
| 2. s-ino Maria G. Saralieva | " |
| 3. s-ro Hristo Ml. Cvetkov | " |
| 4. s-ino Petruna d-ro Korabova | Sofia |
| 5. s-ro Kosta D. Kostantinov | v. Ustrem — Elhova |
| 6. s-ro Belčo Oktomvrijski, | Sofia |
| 7. s-ro Atanas Lakov | Ŝumen |
| 8. s-ro Ivan K. Vasilev, | Pazarĝik |
| 9. s-ro Nikola Jotov | " |
| 10. s-ro Georgi D. Spasov | " |
| 11. s-ro Petr K. Vasilev | " |
| 12. s-ro Vasil D. Lazarov | " |
| 13. s-ro Ĥristo Kokotanov | " |
| 14. s-ro Jordan St. Lupov | " |
| 15. s-ro Sotir K. Vasilev | " |
| 16. s-ro Bencion Danon | " |
| 17. s-ro Georgi Tanev | " |
| 18. s-ro Atanas Furnaĝiev | " |
| 19. s-ro Ĵak M. Behar | " |
| 20. s-ro Krâstu V. Ĉergarov | " |
| 21. s-ro Stojan Ĥr. Tanev | " |
| 22. s-ro Ivan Kacarov | " |
| 23. s-ro Eliezer S. Semov | " |
| 24. s-ro Nikola Ĵelev | " |
| 25. s-ro Ivan Stojanov | v. Saladinovo |
| 26. s-ro Nikola Peŝterliev | " |
| 27. s-ro Ivan Kotov | Ruse |

KURACISTA REVUO

UZAS ESPERANTON

Aperis en Praha la unua numero de «Lékařská revue» (Kuracista revuo). La revuo havas intencon uzi la kvar parolatajn en Ĉeĥoslovakio lingvojn, kaj ankaŭ esperanton. Ĉiu grava artikolo estas rezumita en esperanto. La redakcio promesas enpresi ankaŭ originale verkitaĵn en esperanto artikolojn. Do, la medicina scienco, kiu uzis en mezepoko internacian lingvon (latinan), hodiaŭ ankaŭ uzas tian, sed tio estas nia ŝatata esperanto.

Adreso: Lékařská revue, Praha 11, Palackého ul. 15. Dumjara abono: 60 ĉsl. kr.

ESPERANTO ĈE LA LYON'A FOIRO

La uzado de esperanto ĉiujare pligraviĝas ĉe la lyon'a foiro. La statistiko montras, ke la nombro de esperantaj korespondantoj kreskis.

RADIO

RADIO SOFIA. La 15-an de majo je 22.30 h. parolos f-ino Anka Marikina en esperanto.

— На 27 май на 21 ч. ще говори секретарятъ на съюза г. Бълчо Октомврийски на тема „За есперантската литература“.

RADIO LJUBLJANA (569.3 m 5 kw). La 13-an de majo 1937 je la 22-a—23-a hore disaŭdigos Ljubljana la trian ĉijaran esperanto-vesperon. Esperanta klubo denove preparis tre interesan esperantan vesperon sub la nomo „Slovenaj somerrestadejoj“ enhavantan paroladojn, dialogon, trialogon, slovenajn popolkantojn kaj nacian muzikon.

La programo estos jena:

1. Slovenaj somerrestadejoj kaj kuraclokoj. Prelegos s-ano Kozlevĉar Jože.
2. Bled, perlo de Slovenio. Dialogo. Kunlaboros ges-anoj Vranĉiĉ Ida kaj Krambergar Franc
3. Romantika Bohinj. Prelegos s-ano Mizerit Deziderij.
4. Ekskurzo al Rogaška Slatina. Trialogo. Kunlaboros ges-anoj: Cukale Ela, Volk Alojzij kaj Korenc Riko.

Inter unuopaj programpunktoj estos disaŭdigotaj slovenaj popolkantoj kaj slovena nacia muziko pere de harmoniko.

Gesamideanoj tutmonde, aŭskultu Ljubljanan! Disvastigu la novaĵon en viaj naciaj gazetoj, instigu la geesperantistojn kaj konatulojn al auskultado! Esperantaj grupoj kaj organizoj, aŭskultu kolektive!

Skribu nepre dankesprimojn al la radiostacio de Ljubljana.

RADIO KAŬNAS. Ĉiu marde je 21.30 ĝis 21.45 (meze-europa tempo) A. Poŝka gvidas esperantan anguleton. Aŭskultu!

La lyon'a foiro eldonis novan kvin-koloran afiŝon 70—100 cm. kaj novan sorbpaperon. Tiuj propagandiloj estos sendataj senpage al la esperantistaj grupoj, kiuj deziras ilin utiligi por ekspozicioj. Estos aldonataj prospektoj kaj poŝtkartoj laŭ la restanta provizo.

Skribu: Foire de Lyon, Esperanto-fako, rue Ménéstrier, Lyon (Francujo).

NIA VIVO

Pazarĝik. Societo „Radio“ vigle agadas. La kongreskomitatanoj kunvenadas ofte kaj solvas administrajn kaj teknikajn demandojn pri la bona aranĝo de nia XXIV-a kongreso, kiu okazos je 19—20—21 de junio en nia urbo.

— Funkcias du kursoj: por progresintoj, gvidata de s-ano Ĵak M. Behar, kaj por komencantoj kun 30 gekursoj gvidata de s-ano Ivan K. Vasilev.

V. Progorelec—Loma regiono. S-ano Toŝo G. Velkov gvidas kurson por komencantoj kun pli ol 30 gekursoj. Granda entuziasmo.

Ruse. Societo „Espero“ vigle laboras. Ĝi malfermis du vesperajn kursojn: en la legejo „P. R. Slavejkov“ kun 30 partoprenantoj, gvidata de s-ino Petranka Lazarova kaj la dua — en la salono de kafejo „Muzikant“ kun 15 gekursoj, gvidata de s-ano Dim. Ivanov. Baldaŭ oni malfermos kurson por lernantoj en la meblista lernejo.

— La societo aranĝis je 20. de februaro en la „Kooperativen salon“ sian

La esperanta oficejo gazetara post mallonga tempo komencos aperigi konstantan esperantlingvan bultenon gazetarajn por la esperanta gazetararo de la tuta mondo. Redakcioj kaj ĵurnalistoj, kiuj deziras ricevi la bultenon, estas petataj ĝin ekpostuli. La bulteno estos sendata tute senpage.

La esperanta oficejo gazetara sin turnas al ĉiuj esperantaj gazetoj, ĵurnalistoj kaj aliaj volontuloj pri alsendo de esperantaj gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj, same pri alsendo de novaĵoj pri la esperanta movado.

La esperanta oficejo gazetara liveras senpage materialon pri Polujo kaj pri la esperanta movado en Polujo.

Adreso: Antoni Pisarski — Woydakowski, Direktoro de la Esperanta oficejo gazetara, Warszawa 1, poŝtkesto 408, Pollando.

tradician vesperfeston, kiu bone sukcesis

— La societo aranĝas kongreskaravanon al Varsovio, okaze de XXIX jubilea esperanto-kongreso je 7—15 de aŭgusto. Petu informojn de: Dimitr Ivanov, str. Prista, 28.

Sevlievo — Ĉe la gimnazio malfermis bone vizitatan kurson por komencantoj gvidata s-ano Simeon St. Hesapĉiev, instruisto de bulgara lingvo. La kursoj pagos takson — 20 lv. La kolektotan sumon oni uzos por fondi esperantan fakon ĉe la biblioteko de la gimnazio.

Sofia. La 6-n de februaro okazis nia tradicia vesperfestado en la granda salono „Koop“. Novaj kaj malnovaj samideanoj amase vizitis la feston. La tuta muzik-literatura parto, en kiu partoprenis precipe samideanoj, estis bonege plenumita. Nia esperantohoro kantis solene nian himnon kaj kelkajn tre aŭskultindajn kantojn. Regis gaja kaj tre amika atmosfero. Sukceso — morala kaj materiala — grandega kaj esperiga. — Sofia samideano eniras novan periodon de brila antaŭenirado kaj disvolviĝo.

— La 15-an de februaro antaŭ mikrofono de radio Sofia parolis nia s-ano Emil Stratev je temo „Ekonomia Bulgarujo“. Sekvas diversaj paroladoj je 15 de ĉiu monato.

— Aperis 5-a numero de nia „Murgazeto“. Enhavas varian kaj tre interesan materialon. Multaj bildoj kaj ilustritaj kartoj, el ĉiuj landoj, ornamas kaj plibeligas la eksteran aspekton.

Ŝumen. Societo „Vekiĝo“ malfermis 2 monatan esp. kurson por komencantoj en la lernejo „Andrejkovo“. Gvidanto Tod. Lazarov.

Varna. Malgraŭ la multaj baroj kaj malfacilaĵoj, renkontataj sur ĉiu paŝo, la esperanto-movado en nia urbo rapide progresas.

La du bomboj, ĵetitaj dum la aŭtuno en nian klubojn, ne timigis la esperantistaron.

Spite al ĉiamaj minacoj flanke de konservativuloj kaj kontraŭuloj, niaj anoj daŭrigas sian regulan laboron.

— Ĉiulunde ni havas specialan horon por „viva gazeto“. Oni legas artikolojn kaj referaĵojn pri plej diversaj temoj.

— La unua numero de nia „murgazeto“ jam delonge aperis. Nun ni preparas la duan numeron. Ĝi estas tre riĉenhava kaj interesa, kaj niaj gesamideanoj ĝin atendas senpacience.

— La 20-an de februaro ni aranĝis amuzan vesperfeston en la salono „Majka“. Malgraŭ, ke ĝi ne estis tre bone anoncita, la vizitantoj estis tiom multaj, ke la salono estiĝis malvasta por ĉiuj. La varna urbanaro bonege helpis nin morale kaj materiale, amase vizitinte la vesperfeston.

Niaj anoj ankoraŭ unufoje manifestis sian deziron kaj pretecon por laboro. La programo estis bonaranĝita kaj interesa. La publiko atente aŭskultis ĝin. Ĉe amika atmosfero kaj granda intimeco la vesperfestado finiĝis per dancoj, malfrue dum la nokto. Ĉiuj reiris hejmen tre ĝojaj kaj kontentaj.

— Por firmigi ankoraŭ plie la ligilojn inter la novaj kaj malnovaj gesamideanoj, la societo ĉiudimanche, aranĝas duontagajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵoj de Varna. Niaj anoj amase vizitadas ĝin. En kantoj, ludoj kaj naciaj dancoj la tempo forpasas tre amuze.

DEZIRAS KORESPONDI

S-ro G. Selhorst, botanikisto Burgm. Peecklaan 252, Schoore, Holando — kun bulgaraj gesamideanoj pri ĉiu temo. Deziras same interŝanĝi poŝtm., esp. presajojn k. t. p.

S-ro Ilija Jamukov, v. Bojanovo, Elhovska okolija, Bulgario — kun gesamidenanoj en la tuta mondo. Respondo garantiita.

Gegimnazianoj — kun la tuta mondo pri diversaj temoj. Turnu vin al: Simeon St. Hesapčiev, instruisto de bulgara lingvo, Sevlievo, Bulgario.

Bonvolu skribi tuj ilustritan karton mendante senpage belan memorigan poŝtmarkon de la brazila poŝto kun teksto en esperanto. Ĝi estas utila al via propagando. Adresu al s-ro Ismael Gomes Braga, Rua José Vicente 79, Andarahy, Rio de Janeiro, Brazilo, Sud-Ameriko.



Esperanto-kurso por komencantoj en v. Kneja.
Gvidanto s-ano Milčev.



Esperanto-kurso por komencantoj en Sofia.
Gvidanto s-ano Georgi Dimov.



Esperanto-kurso por komencantoj en Sofia.
Gvidanto s-ano Kiril Drajev.

RICEVITAJ PRESAĴOJ

Libroj, broŝuroj k. a:

George Fox fondito de la Religia societo de amikoj (kvakeroj). Prezo: 3 pencoj.

La societo de amikoj (kvakeroj kaj ĝiaj esencaj trajtoj. Esperanta traduko de prelego de Edward Grubb, M. A. — verkisto de „Kio estas la kvakerismo?“, „La biblio: ĝia karaktereco kaj inspiro“, „La kristanismo kiel vivo“, „La kristanismo kiel vero“, k. t. p. Aĉetebla ĉe la sekretario, Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N. W. 1. Prezo 3 pencoj.

Memorando pri militrezistado kaj esperanto prezentata de la Internaciano de kontraŭmilitistoj. Prezo 1 penco.

Jarlibro de IEL 1937. Neaĉetebla. Sendata nur al individuaj membroj de IEL. Kotizoj: membro kun jarlibro — 4 angl. ŝil., membro-abonanto — 10 angl. ŝil.

Jarlibro 1937 de S. A. T. Sendata nur al la membroj de S. A. T. Asocia sidejo: 67, Avenue Gambetta, Paris, 20.

Verema raporto pri la german-molsa milito. Rakontoj pri „Noodles“, „Schildbürder“, „Molboer“. Esperante por komencantoj. 25 paĝoj. Prezo: 2 poŝt. resp. kuponoj. Mendebila ĉe la verkisto-eldonisto P. Th. Justesen, Fannerup per Kolind, Danujo

El la nebulo. Tre facila legolibro por komencantoj. Dua eldono, 24 paĝa, prezo 0 50 danaj kronoj. Aĉetebla ĉe: Dansk Esperanto Forlag. Thyrasvej 15. Aabyhøj, Danlando.

Kleines Taschenwörterbuch Deutsch Esperanto von dr. Emil Pfeffer. Reinhold — Verlag: Abteilung „Osterreichischer Esperanto-Verlag“ Löblichgasse 3. Wien IX.

Tri rakontoj de L. N. Tolstoj. Tria eldono. Eldonejo Heckner, Wolfenbüttel (Germanujo).

Esperanta stenografio laŭ la sistemo de Gabelsberger. Verkis d-ro Albert Schramm, direktoro de la muzeo de l' libro en Leipzig. Dua eldono. Eldonejo Heckner, Wolfenbüttel (Germanujo).

XII-a somera universitato, int. konferenco de instruistoj int. konferenco de virinoj. Dun XXV. II-a universala kongreso de esperanto en Wien, aŭgusto 1936. Kompilita de kortega kons. Hugo Steiner, Int. esp. muzeo — Wien.

Esperanto en Brazilo. Plinotindaj datoj kaj faktoj memorigaĵo de la 9-a brazila kongreso de esperanto.

Gvidlibro pri Rio-de-Janiero ĉefurbo de Brazilo. Aperinta dum la 9-a brazila kongreso de esperanto, novembro 1936.

„ĈIELARKA STANDARDO“

estas la unua kaj sola internacia kooperativa gazeto esperantlingva. Originalaj artikoloj el teorio, historio, nuna stato, praktiko kaj bibliografio de kooperativismo el ĉiuj landoj. Jara abono 7 sv. fr., pageblaj ankaŭ kvaronjare.

Interesatoj petu specimen-numeron ĉe la Eldon-Kooperativo «Spółnota Pracy» Warszawa (Varsovio) str. Marszałkowska 149 9, Pollando.

Tutmonda adresaro de korespondantoj kaj kolektantoj POLYGLOT, aperas ĉiumonate kaj enhavas adresojn el diversaj regionoj de la mondo. Petu tuj senpagan provnumeron! Eldonanto: S-ro V. A. Jarolímek, Praha XIII. — Strašnice 985, Ĉeĥoslovakujo.

Esperanto-presejo „Kulturo“, — Sofia